

Literatura Mondo, 4-a parto: La rubriko *Disputo*, Kopar, rimvortoj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 630, 1975.11.05 & 08

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la aŭtunaj monatoj ni trafolumos kun vi la epokfaran revuon **Literatura Mondo**.

A.- La rubriko *Disputo*, kiun plej parte nutris **Kolomano Kalocsay** aŭ **Kopar** (kaŝnomo de Kalocsay), tucerte influadis multajn legantojn.

Cl.- En sia unua artikolo aperinta en la 1-a numero de la 1-a jaro de **Literatura Mondo**, Kalocsay pledas favore al la uzo de asonancaj rimoj. Ni tre resume citas lin :

A.- « *Rimi en Esperanto ne estas malfacile. La radik-finaĵoj, plensonoraj per la forta akcento kvazaŭ tentas, alvokas «kunrimigu nin».* Kaj jen, homoj, kiuj neniam provis ĉarpenti eĉ unu strofon en sia gepatra lingvo, lerninte Esperanton, subite trovas en si kapablon poezian kaj provas per kuraĝa salto eksidi sur la dorso de la Pegazo. La hazardo, ke doloro-koro-floro-ploro-memoro, amo-flamo, morto-sorto, ktp. interrimas, la ebleco de rimoj kiel koreto-maneto, amego-dolorego, eĉ vidadas-voladas, estas kulpaj pri multaj kaj neatenditaj **poetiĝoj**. Sed konkludi el ĉi tio, ke Esperanto estas riĉa je rimoj, estus tute erare. Ĉar la **adasismoj** ne estas rimoj. Per Dio kaj diablo ! Ili ne estas rimoj ! Krimoj ili estas ! »

Cl.- **Kalocsay** demonstras, ke la nombro de la poezie uzeblaj rim-vortoj estas malgranda. La tradukanto uzanta nur purajn kaj verajn (ne adasistajn) rimojn, staras multfoje antaŭ apenaŭ plenumebila tasko.

A.- Tial **Kalocsay** proponas kontentiĝi, kiam tio estas necesa, je asonancaj rimoj, kiel sorĉa-dolĉa, pinta-inda, montri-tondri, kaŝo-balaĵo, soifa-naiva, ktp. La parencaj konsonantoj kaŝas sin en la ombro de la forte akcentita vokalo. Kalocsay konkludas sian proponon per demonstra poemo, kie la rimoj nur asonancas :

Cl.-	Moron ŝanĝi	Etas sorĉe
	Vojon tranĉi	Ja se dolĉe
	Novan en arbar' de rimoj	Purerima vers' nin ĉarmas,
	Mi vin vokas	Sed ĉu manke,
	Kaj allogas,	Malaltrange
	Karaj fratoj kaj fratinoj.	Se ĝin asonancoj garnas ?

A.- **Kolomano Kalocsay** havis imitantojn, kiuj ne timis uzi tiajn asonancajn rimojn, kiam veraj ne estis troveblaj.

Cl.- La pronomo **ĉi** vekis unuan debaton. **M. Arco** pledis, por ke oni rehabilitu la pronomon **ĉi**. Neniu subtenis lin. Responde **Kopar** skribis :

A.- « *Laŭ nia sento Esperanto estas vi-lingvo eble ankoraŭ pli ol la angla lingvo estas you-lingvo. [...] Mi devas konfesi, ke la ĉi al mi tute ne faras impreson de intimeco, doloro aŭ karesemo, sed mi aŭdas en ĝi fremdan, malagrablan siblon, kvazaŭ insulton. [...] Tamen estas eble, ke mia lingva sento trompas min. Tial mi petas la helpon de niaj legantoj, ili esprimu sian opinion pri la afero. [...] »*

Cl.- **Herbert Hammer** prave respondas al **M. Arco**, ke « la kutimo ne uzi en Esperanto intiman alparolan pronomon ŝajnas unuavide kritikinda – por **ci-lingvanoj**. Tamen se oni pli profunde esploras, oni devas konstati, ke la preskaŭa manko de **intima** alparola pronomo neniam malriĉigas nian lingvon, ĉar intimeco ne dependas de la pronomo uzata. Oni faru observojn en naciaj lingvoj uzantaj ekvivalenton por **ci** ! Ĉu oni ne devas konstati, ke ekzistas multaj personoj, kiuj ĉiam **ci-adas** sin reciproke (evidente pro kutimo), kvankam iliaj interrilatoj estas ofte tre malvarmaj kaj nekoheraj, - do neniel intimaj. Aliflanke estas ankaŭ homoj neniam uzantaj la intiman pronomon, ĉe kiuj reciproka intimeco tute ne mankas. La aplikado de nur unu alparola pronomo do tute ne malebligas la intimecon. »

A.- **Selma Anner** el **Laihia**, Finnlando, alportis citindan respondon : « **Ci!** Estas laŭ mia lingva sento vere malbela vorto. Ĉu vere estas necese havi pli intiman alparol-formon, ol la kutima vi ! El mia propra vivo mi povas diri, ke en nia familio, uzanta por ĉiutaga interparolado **nur** Esperanton, neniam estis ia fremda sento, kiam ni uzas **vi**. Ni estas vera Esperanto-familio, ĉar mia edzo estas finno ne sciante alian lingvon krom Esperantan kaj finnan, mi estas germanino, same nur sciante Esperantan kaj germanan lingvon, kaj miaj tri duon-infanoj – okjara filo, kvin – kaj tri-jaraj filinoj -, ni ĉiuj nur uzas Esperanton kaj vi. »

Cl.- **Kopar** konkludas la diskuton dirante : « *Precipe grava estas por ni la opinio de sinjorino **Selma Anner**, por kiu Esperanto estas vere kvazaŭ ĉiutaga pano, kaj kiu tamen ne sentas ĉi tiun panon sengusta pro la manko de intima pronomo. [...] Uzi **ci**, laŭ mi, estas signo, ke oni ne sentas ankoraŭ plene la guston de la Esperanta lingvo, kaj volas provizi ĝin per la gusto de sia lingvo nacia.* »

A.- Ni donis al vi tiujn ĉi du disput-resumojn. Vi povis konstati, ke la disputo estas tre milda. Pro tio ĝi iom post iom alprenis novan titolon : **Leterkesto**. Tiam ĝi subite fariĝis pli vigla, pli malmodera. Tamen en la unua periodo de **Literatura Mondo** la rubriko **Disputo** aŭ **Leterkesto** neniam alfrontis fundamentajn demandojn lingvajn aŭ stilajn. Nur detalojn minorajn ĝi pritraktis. Ŝajnas, ke tiuj diskutoj tamen ne vanis. Ili kondukis la legantaron de **Literatura Mondo** al komuna lingvosento.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!